

& La Vojo kaj Preĝo verdaj:

< Rekante 84 el 145 batoj por strofo, entute 1450 paŝoj dum 17 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (, &1, 1896; , &2, 1905). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(<:145> i;Ti /La domi re remi do TiLa Ti Ti;do Ti Tido Ti LaSi La La;Ti La domi re remi do TiLa Ti Ti;do Ti Tido Ti LaSi La La

(#Rekantaĵe: a;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi do re e;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi re do)

o;Ti La domi re remi do TiLa Ti do;re mi doTi do Sodo Ti doTi La La

(#Rekantaĵe: a;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi do re e;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi re do)

o;mi mi domi so mimi mi redo re re;mi so miso so somi re do

(#Rekantaĵe: a;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi do re e;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi re do)

)×(4?5+6))+

(&Strofoj:

, &1 . La vojo:

'1 Tra /densa mallumo briletas la celo ; al kiu kuraĝe ni iras ; simile al stelo sur nokta ĉielo ; al ni la direkton ĝi diras

(×: &R: (La vojon antaŭen en danco **espera ; senhalte paŝadas ni.**)×2)

kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj ; nek batoj de l' sorto nek mokoĵ de l' homoj

(×: &R)

ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita ; ĝi estas, la voj' elektita.

(×: &R)

'2 Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ; ni iru la vojon celitan! ; Eĉ guto malgranda, konstante frapante ; traboras la monton granitan L' espe2ro, l' obstino kaj la2 pacienco ; jen estas la signoj, per kies potenco ni, pa2ŝo post paŝo, post lo2nga laboro ; atingos la celon en gloro.

'3 Ni semas kaj semas, neniam laciĝas ; pri l' tempoj estontaj pensante ; cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, - ; ni semas kaj semas konstante "Ho ĉesu" mokante la homoj admonas, - ; "Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas: "Obstine antaŭen! La nepoj vin benos ; se vi pacience eltenos."

'4 Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj ; velkantajn foliojn deŝiras ; ni dankas la venton, kaj, repurigitaj ; ni forton pli freŝan akiras Ne mortos jam nia bravega anaro ; ĝin jam ne timigas la vento nek staro Obstine ĝi pasas, provita, hardita ; al cel' unu fojon signita!

,&2. Preĝo sub la verda standardo:

'5 Al Vi, ho potenca senkorpa mistero, ;
fortego, la mondon reganta, ; al Vi, granda
fonto de l'amo kaj vero ; kaj fonto de vivo
konstanta, al Vi, kiun ĉiuj malsame
prezentas, ; sed ĉiuj egale en koro Vin
sentas, al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu
reĝas, ; (hodiaŭ)×2 ni preĝas.

'6 Al Vi ni ne venas kun kredo nacia, ; kun
dogmoj de blinda fervoro ; ; silentas nun
ĉiu disput' religia ; kaj regas nun kredo de
koro. Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala, ;
kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala, ni
staras nun, filoj de l'tuta homaro ; (ĉe
Via)×2 altaro.

'7 Homaron Vi kreis perfekte kaj bele, ;
sed ĝi sin dividis batale; popolo popolon
atakas kruele, ; frat' fraton atakas ŝakale.
..... Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera, ;
aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
redonu la pacon al la infanaro ; (de l'
granda)×2 homaro!

'8 Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali, ; por
reunuiĝi l' homaron. ; Subtenu nin Forto,
ne lasu nin fali, ; sed lasu nin venki la
baron; donacu Vi benon al nia laboro, ;
donacu Vi forton al nia fervoro, ke
ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj ; (nin
tenu)×2 kuraĝaj.

'9 La verdan standardon tre alte ni tenos; ĝi
signas la bonon kaj belon. ; La Forto
mistera de l' mondo nin benos, ; kaj nian
atingos ni celon. Ni inter popoloj la
murojn detruos, ; kaj ili ekkrakos kaj ili
ekbruos kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj
vero ; (ekregos)×2 sur tero.

'10 Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj, ;
antaŭen kun pacaj armiloj! ; Kristanoj,
hebreoj aŭ mahometanoj ; ni ĉiuj de Di'
estas filoj. Ni ĉiam memoru pri bon' de
l' homaro, ; kaj malgraŭ malhelpoj, sen
halto kaj staro al frata la celo ni iru
obstine ; (antaŭen,)×2 senfine.)